**JANUARO 2013**

EG



**N° 133**

*La « Espéranto-Gironde » Informilo*

# ESPERANTO GIRONDE

**Deziras al ĉiuj membroj (kaj la aliaj ...)**

**Feliĉon, bonan sanon, bonan moralon,**

**multajn aktivadojn**

**por tiu nova jaro 2013**

# ESPERANTA SEMAJNO EN NATURAMIKA MEDIO.

De la 8a ĝis la 15a de septembro, Marcelo kaj mi pasigis semajnon en la naturamika domo « La Martinière », pri kio la sekcio de Niort respondecas kaj zorgas.

Jam de du jaroj amikoj el Villeneuve d'Asq petis de ni, ke ni animu renkonton kiel okazis en 1999 en la pirenea valoLouron. Post tiu renkonto kie ni konatiĝis tiuj naturamikoj esperantiĝis dum du esperantistoj el Ĝirondio naturamikiĝis.

La regiono de Niort estis elektita unue pro la geografia situacio, due ĉar kelkaj el niortaj naturamikoj ankaŭ estas esperantistoj, trie pro la oportuna loko « La Martinière ».

Bedaŭrinde post kontrolo de sekureckomisiono « La Martinière » devis fermi parton de dormejo subtegmento, kaj restas nun dek tri litojn por gastoj. Aliaj rajtas nur tendumi sur apuda tereno. Fine ni estis ok fidelaj dum la tutasemajno en tiu kvieta loko. Monique el Niort, Jean Pierre kaj Brigitte el Villeneuve d'Asq, Michèle el Châlon en Champagne, Maryvonne kaj Michel el chaumont, Marcelo kaj mi. Kvar aliaj devus veni sed lastminute rezignis pro malfacilaĵoj.

Ni praktikis esperanton diversmaniere : pro neceso de ĉiutaga vivo, ekzemple preparado de manĝo, dum promenadoj, per ludoj, per kantoj, ankaŭ per simplaj paroladoj.

Ni vizitis diversajn lokojn : urbo Parthenay, apuda arbaro de Secondigny, poteva marĉo kie ni luprenisbarkon, nun fermita minejo en Faymoreau. Ni ankaŭ promenadis tra konservatoriejo kie kreskas multnombraj diversaj pomarboj kies nomoj pli kaj pli malaperas en la nunaj modernaj vendejoj. Tie mi estis kortuŝita de kompatindaj pomoj kiuj falis surgrunden kaj ploris . Do mi adoptis kelkajn kiujn mi kaŝe alportis en miaj poŝoj. La aliuloj ridetis, ŝercis, demandante ĉu ni rajtis tion rikolti antaŭ ol reveninte bone frandi…

Dum la semajno pluraj lokaj naturamikoj aŭ esperantistoj vizitis nin surloke kaj partigis tempon kun ni.

Monique Heiderich prezentis al ni libron kiun ŝi esperantigis el franca verko : « Borde de la rivero B214 ». Temas pri fikcio kiu okazas en Vendeo.Tiun enigman titolon ni komprenas nur fine de la legado. Mi instigas vin legi ĝin.

Kompreneble oni ankaŭ regalis nin per lokaj bonsgustaj kukoj.
Mi ne bezonas diri ke la etoso estis tre simpatia kaj ke ni ĉiuj ĝuis agrablan semajnon ; despli ke ankaŭ la vetero estis bela.

Tiuj kiuj ŝatas provi frandeman vojaĝon trovos ĉi-sube receptojn de kukoj el Potevio kiujn Monique Assailly kuiris por ni.

Bonan apetiton.

*Claudine*



**Rakonto de avo kiu ne ŝatis kukojn.**

La pudoro ne celas nei niajn sentojn sed la pudoro ebligas pli bone ilin enmemigi, por donaci plenkonscie.

Iam, maljuna avo ĉeestis al la edziĝofesta manĝo de sia lasta nepino. Li sentis sin feliĉa serena kvieta meze de sia tuta familia ĉirkaŭantaro. Ĉies ĝojo kaj feliĉo varmigis lin pro milda tenereco. Kiel bela ŝi estas lia nepino vestita per mirinda blanka robo. Bonkore ŝi ridis, partigante kun sia juna edzo, la belegan turan kukon, brilantan de hela karamelo kaj de rozaj sukermigdaloj.

Metante la kremplenajn pufkukojn sur blankajn teleretojn, ŝi diris « servu vin mem, pasigu al viaj tablonajbaroj ! »

La nepino donis la teleron al sia avo : « aĉjo Pako prenu kukon ! »

Sed ŝia atenta patrino intervenis " ne ! pasigu la pladon, vi ja scias ke aĉjo ne ŝatas kukojn". Post silento, subite, oni aŭdis la ĝojan voĉon de la avo " Sed, jes ja mi ŝatas kukojn. Eĉ mi tuj elektos tiun ĉi belan.

"Kio ! ĉu vi ŝatas kukojn? mi mem, via kvindekjaraĝa filino, neniam en mia vivo, vidis vin manĝante kukojn".

"Sed ne dum la mia ! kaj mi ĉiam ŝatis kukojn. Tiuepoke kiam vi estis geknaboj, ni estis malriĉaj, vi bone scias tion ! kukojn, via patrino povis aĉeti nur unufoje de tempo al tempo, nur festdimanĉe. Evidente ŝi aĉetis unu por ĉiu ; sed filineto mia, sidanta sur miaj genuoj, mi vidis viajn okulojn dum vi plezurege manĝegis vian kukon ; mia kontentiĝo estis rigardi vin manĝante la mian kiun bonkore mi donis al vi ; kaj mi ĉiam aldonis por pliigi vian plezuron " manĝu karulineto mia, mi ne ŝatas kukojn".

Dirante tion la avo ridetis, lulante la kapon. Ridante plene li ankoraŭ diris " jen estas festo hodiaŭ, donu al mi la lastan ! Se vi plu tiel tremas ĝi falos ! ĉu pro malvarmo, ĉu pro emocio ?

Foje amodonacoj, post longaj jaroj, aperas kaj estas ŝatataj plenkonscie. Sufiĉas tenera momento, kiu same kiel la delikateco de florpetalo, rivelas memoraĵon.

++++++++++++

*Teksto de Jacques Salomé tradukita de Monique Heiderich el Vendeo.*

***Okaze de la venonta kongreso de IFEF kaj UFE, en Artigues près Bordeaux, la koro INTERKANT prezentos prelego-spektaklon pri la opero de***

## 20-A KORUSO-STAĜO

En **ESPERANTO** kun skiado, turismo kaj laŭeble kun folk-muzik-aj interŝanĝoj
**De vendredo la 1a ĝis sabato la 9a de marto 2013**
En la feriejo de **LA BASTIDE/HERS (Arjeĝujo**) en katarisma Nord-Pirene-ejo.
La korusan laboron gvidos bulgara korusestrino **Zdravka BOJĈEVA**
Plurvoĉaj kantoj el diversaj tempoj kaj teritorioj
Pro lastfojaj spertoj pluraj partoprenontoj alportos plurajn el siaj muzik-instrumentoj por ankaŭ laŭeble folk-ludadi kun lokaj spertuloj.
Por pli da informoj turnu vin ĉe :
***COMTE Georges – JORGOS ESPERANTO 11420 LAFAGE***
***tutpeko@aliceadsl.fr***

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

**Ĉelima**
**68 a kongreso de**
**SAT-AMIKARO**
**En METABIEF (25)**
**De la 30a de marto ĝis la 2a de aprilo.**

+++++++++++



# HEROO EN LA VIVO KAJ BATALO

Ĉi jare finiĝas 105 jaroj post la naskiĝo de la elstara bulgaro Trifon Hristovski. Kiu estis li? Homo kun kripla malpotenca korpo, sed kun selime forta spirito. Senigita de ĝojoj en la vivo, li trovas altan celon kaj plej sekuran sencon de sia vivado en senlime malbonaj kondiĉoj disvolvi siajn spiritfortojn kaj fariĝi modelo por siaj dekmilaj legantoj kaj servantoj. La batalanto-verkisto kun energio, fideleco kaj amego al la bulgara laborema popolo kaj la homaro, senĉese kontribuas al sopirata homara idealo, nome de la plena liberiĝo de la kaboristaro el la ĉenoj de kapitalisma ekspluatado, kreado de feliĉa homaro - sana, forta vigla, klera.

La bulgara antifaŝisto-internaciisto, arda publicisto kaj esperantisto, naskiĝis en malriĉa kamparana familio. Jam suĉjnfano li estis trafita de grava poliomielito; liaj du kruroj kaj dekstra brako estis paralizitaj. Tamen lia koro estis larĝe malfermita por la homaj suferoj.

Hristovski ne kapablis viziti lernejon, sed memklerigis sin. Li legis tage kaj nokte, kolektis multegajn konojn. Unu instruisto-esperantisto donis al li Esperantan libron kaj konsilis lin lerni la internacian lingvon. Do, Esperanto okupis apartan lokon en lia vivo. Li lernis ĝin aŭtodidakte, ĉiam diligente, entuziasme, uzis ĝin ĉiam fruktodone. Danke al Esperanto la ideoj kaj la forta alvoko al batalo por feliĉa estonto de la homaro, trapasis landojn kaj kontinentojn kaj dum la tempestaj jaroj antaŭ la Dua mondmilito, dum la jaroj de ofensivo de la faŝismo, Hristovski estis unu de la aktivaj agantoj por solidareco de esperantistoj el la tuta mondo.

En daŭro de la jaroj li ligis sin kun dekoj da esperantistoj, el Sovetunio, Germanio, Svedio, Francio, Aŭstrio, Hispanio, Usono, Ĉinio, Japanio k.a. Mi neniam supozis, ke mi estos tiel "surŝutita" per leteroj, skribis li en sia aŭtobiografia libro "Mia vivo". Hristovski sendis plurajn materialojn al progresemaj Esperantaj ĵurnaloj kaj revuoj. Liaj materialoj malkaŝis la barbaraĵojn de la bulgara faŝismo, kiam estis fondita la Internacio de proletaj esperantistoj /IPE/ li fariĝis fervora kunlaboranto de ĝia organo "Internaciisto". Kiam en Bulgario aperadis ĵurnaloj /1930-40 jaroj/ "Internacia Laborista-kamparana korespondanto", Hristovski aktive partoprenis ankaŭ en la pretigo de la Esperanto-paĝo de la bulgara ĵurnalo "Zarja" (Ĉielruĝo), respondante pri la rubriko " Miaj internaciaj amikoj". Danke al la leteroj de siaj korespondantoj el Barcelono, li vivis kun la sorto de hispana revolucio, kunlaboris en la Esperanta revuo "Popola Fronto" /1936-1939, aperanta en Valencio. Tiutempe li aktive, "partoprenas" ankaŭ la ĉinan revolucion varbante abonantojn por la progresemaj revuoj "Voĉoj el Oriente" kaj "Orienta kuriero", ricevas kaj disvastigas Esperantajn librojn, broŝurojn, fotojn. La regado de fremda lingvo, li skribis, portis al mi utilon. Ĝi vastigis mian spiritan horizonton, donis al mi riĉajn konojn, ligis min kun malproksimaj kaj nekonataj landoj.

En sia korespondado li avertas pri la minaco al la mondo de faŝista danĝero, vokas al batalo por paco kaj paca kunagado. En siaj leteroj al la germana esperantisto Valter Ditze, socialdemokrato, Hristovski defendas firme la marksismajn poziciojn de la internacia laborista movado. Li korespondas kun pli ol 20 bulgaroj kaj kun deko de eksterlandaj redakcioj, libroeldonejoj, librovendejoj kaj bibliotekoj. Ĝis nun estas eltrovitaj ĉirkaŭ 3.000 leteroj, skribitaj de li, aŭ al li. Vera dokumenta trezoro! Al lia plumo apartenas la verkitaj kun prublicista pasio kaj eldonitaj libroj: "La morto de Hristo Botev" - genia bulgara poeto-revoluciulo - kaj "Problemoj de la vilaĝo". Estas konservitaj la manuskriptoj de liaj neeldonitaj libroj: "Amo kaj edzeco" "La vivo en vilaĝo" "Ne estingiĝas" kaj noveloj kaj rakontoj.

Hristovski kreas vivante en neimagebla mizero. La polico persekutas la "danĝeran por la socia ordo" junulon. Iuj fojoj la policistoj devis surbrake porti lin al la arestejo, neniigas liajn librojn kaj korespondaĵojn, minacas lian familion. La aĉa invalideco turmentigas lin, venas novan malfeliĉon: la tuberkulozo- skurĝo por la popolo en la kapitalisma mondo.

Je la fino de sia vivo kaj danke al insistoj de kamaradoj, per sia nura iomete sana mano, sed kun kredo je la venko de siaj noblaj ideoj, li verkis la aŭtobiografian libron "Mia vivo". Ĝi estas vere konfeso pri nehome peza sorto. Li skribis "La vivo iom post iom estingiĝas en mi. Kiom longe daŭros mia agonio, neniu scias. Mi akceptos la finon trankvile, firme, samkiel mi akceptis ĉiujn malfeliĉojn kaj maloportunaĵojn en la vivo. La nura deziro, kiu min ankoraŭ tenas blinde al la vivo, estas la deziro ĝisvivi kaj ĝisatendi la realigo de la granda idealo, por milionoj da homoj kiuj oferis sian vivon..."

Internaciisto p. 12 Nº 102 oktobro/decembro 2010

"Mia vivo" Jam havas kelkajn eldonojn en bulgara lingvo kaj la Bulgara E-Asocio ĝin eldonis esperante dufoje. En 1984, oni ĝin eldonis en la franca lingvo en Belgio, sekvis eldonoj en germana, ukrajna, rusa kaj mongola lingvoj.

La maldeca morto interrompas lian flugon al la hela idealo. Tie senmova, prizorgata de sia maljuna patrino, la 17-an de majo 1944, li forlais la tiel amatan de li mondon. Nun en Radotina restas la naskiĝdometo de Trifon Hristovski, transformita en muzeon. Dum la socialisma periodo ĝi estis vizitata de centoj da bulgaraj kaj eksterlandaj esperanntistoj, gejunulo kaj aliaj civitanoj. Nun, ho ve, dum la kapitalisma "nova demokratio" en nia lando, jam 20 jaroj preskaŭ neniu ĝin prizorgas, multe de eksponaĵoj estas priŝtelitaj.

Hristovski ne vivas, sed vivas lia heroeco. La esperantistoj, la progresemaj homoj el la tuta mondo ne forgesos lin.Ili konservos la karan rememoron pri li, ĉar ĉiu inda ekzemplo estas vojmontra stelo por la estontaj generacioj.

Cvjatko TODOROV

**Manfred Arnold**
**(dediĉe al la bulgara kamarado Trifon Hristovski)**

**Batalo estis la enhavo**
**de via sencoplena vivo**
**Per via plumo vi batalis**
**-unue nur en via lando-**
**per eltenema energi'**
**por progresema prespektivo**
**Eĉ aŭdis vin la tuta mond'**
**ĉar skribis en Esperanto**

**"Por la feliĉo, por liber!**
**ja estis ĉiam via moto.**
**Por tio estis vi model'**
**vi, komunist' kaj patrioto!**
**Al vi, heroo de l'popolo,**
**admiro decas kaj impon'**
**Por ni vi restos la simbolo**
**Ni ne forgesos vin Trifon.**

***Artikolo ricevita de mia bulgara korespondanto Cvjatko Todorov.***

*Monique*

++++++++++++++++++++++++++++++++++

# En la kastelo GRESILLON
## *49450 SAINT MARTIN D'ARCE*

Intensaj E-kursoj + KER-ekzameno seminario + interkultura seminario, kun instruantoj el 3 landoj.

**sabato 20a ĝis 27a de aprilo 2013**
=> Lernu intense Esperanton kun Stefan MacGillkaj Christophe Chazarein **
KAJ / AŬ
**sabato 27a de aprilo 2013**
=> Trapasu internacian Esperanto-ekzamenon
KAJ / AŬ
**sabato 27a de aprilo ĝis 1a de majo 2013**
=> Kleriĝu pri inturkultura komunikado kun Radojica Petrović

** *Povas okazi kurso por komencantoj/komencintoj, sed tiuj aliĝas.*

***Bizet : KARMENA.***

## INTERKANT INTERPRETAS « ĈIRKAŬ KARMENA

Tiu spektaklo, « Ĉirkaŭ Karmena », estas tute originale aparta spektaklo pri la samnoma opero de Bizet, konata de ĉiuj. La politikaj kondiĉoj en la 19a jarcento estigis la Karmenan miton. Hispanaĵoj estis tiam tre laŭmodaj en francio.

Didaktika teksto klarigas kaj analizas la cirkonstancojn de la kreado de tiu verko, sed ankaŭ la ĉefajn anedoktojn kaj la simbolismon de la persono-roloj.

En la parolatan tekston enmiksiĝas dancoj, muzikaj pecoj, kantoj laŭ la plej famaj melodioj : Toreador', Habanera, Apud rempar' de Sevilo, knabokoruso, ktp …

La tuto formas koheran, agrablan spektaklon, instruan kaj distran !

Ĝin elpensis : Franjo LEVEQUE.
Ĝin interpretos : la koruso INTERKANT, kun helpo de dancistinoj.
Solistino en la rolo de Karmena : Zdravka LENEPVEU
Piane akompanos : Murielle VEDRINE.
Pripensis la enscenigon : Monique LUCAS.



# LA OBSERVATORIO DE ASTROFIZIKO DE BORDOZO MAL-FERMAS ĜIAJN PORDOJN DE OKTOBRO 2012 ĜIS JUNIO 2013.



Pluraj kupoloj kaj du radioteleskopoj staras sur senobstrukca monteto je 73 metrojn alta, superante Bordozo, ĉe la dekstra bordo de la rivero. Tio estas la observatorio de Bordozo sur la komunumo Floirac, fondita en 1879 pro politiko de malcentralizado de parizana astronomio.

Ĉiu kupolo ŝirmas unu malsaman optikan instrumenton, kiun publiko estas invitata malkovri okaze de la vizito de la loko.

La ekvatoriala fotografa lorno konsistas el du paraleloj, unu cele al perokula observado, la alia al fotografado.

Ekipita per mekanismo por neŭtrigi la teran rotacion, ĝi povas observi ĉielajn objektojn, kio ebligis partopreni en la granda internacia projekto pri la Mapo de l'Ĉielo.

De la fino de la 19a jarcento ĝis la fino de la 20a oni ĉefe, kiel eble plej precize, mezuris la situon de steloj. Pli malproksime granda ekvatoriala lorno servis por observi kometojn kaj asteroidojn.

La gvidisto dum la vizito, klarigas ke la teleskopo, 60 centimetrojn diametra, ebligas observi la satelitojn de la gigantaj planedoj en la suna sistemo.

Krom la optikaj instrumentoj la observatorio disponas du radioteleskopojn uzantajn radioelektrajn ondojn, unu por observi la sunon, la alia la regionojn de formiĝo de steloj.

En tiu observatorio la mekaniko de precizeco ĉie estas kiel en la kerno de dentradaroj de horloĝo.

La vizito finiĝas per projekcio. Dank'al belegaj komentarataj bildoj la vojaĝo pludaŭras ĉirkaŭ planedoj, steloj, galaksioj, ĝis finlimoj de la Universo.

***Observatorio de Bordozo***
***2 avenuo de la Observatorio***
***33270 FLOIRAC***

***kvinopa klubo de Cenon***

# REVUE DE PRESSE



Remise du prix FAME par le bourgmestre d'Aalen à Floréal Martorell, troisième à partir de la gauche.

## DONNEVILLE. FLORÉAL MARTORELL, «NOBEL» DE L'ESPÉRANTO

**Floréal Martorell (Vinilkosmo) a reçu le prix de la fondation FAME à Aalen (dans le Bade-Wurtemberg, en Allemagne).**

Publié le 22/11/2012

En 1981, Floréal Martorell, de Donneville, passionné de musique crée le CAM, Collectif d'Activités Musicales avec l'installation de locaux pour les répétitions de groupes musicaux ( aujourd'hui, vingt locaux sont disponibles ainsi qu'un studio d'enregistrement) . En 1988, Floréal crée Eurokka , association musicale d'Espéranto qui à son tour en 1990, crée le label Vinilkosmo. Depuis 22 ans, ce dernier fait des productions musicales en espéranto diffusées dans tous les continents. Il y a deux ans , la propriété de Floréal a accueilli de magnifiques concerts de portée internationale qui avaient attiré une foule de passionnés d'espéranto. En 1988 Alois Meiners a créé la fondation FAME afin de soutenir la culture de l'espéranto, dans le cadre duquel est attribué le prix FAME avec en prime 3000 €, le prix le plus richement doté dans le monde.

Pour 2012, Floréal Martorell a reçu ce prix, pour ses mérites et son action pour la culture musicale de l'espéranto depuis 22 ans au sein du label Vinilkosmo et de l'association Eurokka basés à Donneville.

La totalité de la somme du prix sera injectée directement dans les projets d'albums de la «Campagne d'engagement pour souscription» lancée en septembre 2012

Floréal Martorell a remis au nom de Vinilkosmo à la bibliothèque-médiathèque d'Aalen une collection d'albums CD en espéranto produits par le label.



La Ciotat

Actualité

**Sport.** Alain Rémy est venu raconter son tour du monde à vélo couché.

**L'aventurier s'est livré au Grand portique**


*Sekvo de la unua aventuro de Renardo (vidu LEGI n° 132)*

Dume, Renardo alvenas : li sate manĝis, lia vizaĝo aspektis ripozita kaj kontenta.

-- He, kara onklo, kio okazas? Vi ŝajnas malbonfarta, ĉu vi estus malsana?
-- Por tio ne mankus bona motivo! Niajn tri dikajn ŝinkojn, ĉu vi scias, oni forprenis de mi.
-- Ha, ridante respondis Renardo, ĝuste. Jes, jen kiel endas diri : oni forprenis ilin de mi. Bone, tre bone. Sed, onklo, ne nur tiel. Endas ankaŭ krii tion surstrate, por ke viaj najbaroj ne dubu pri tio.
-- Ve, al ci veron mi diras, oni forprenis miajn ŝinkojn, miajn dikajn ŝinkojn.
-- Nu, rediras Renardo, ne al mi endas tion diri. Mi scias, tiu plendas, kiu eĉ ne suferas. Viajn ŝinkojn vi ŝirmis de la en- kaj el-irantoj. Vi bone agis, mi plene aprobas vin.
-- Kiel, ŝerculemaĉo, ci ne volas kompreni min. Mi diras al ci, ke oni forprenis miajn ŝinkojn.
-- Diru, diru!
-- Ne estas dece ne kredi nin, tiam diras Damo Hersent. Se ni havus ilin, ni plezure partigus ilin, tion vi bone scias.
-- Mi scias, ke vi spertas pri ruzaĵoj. Tamen ĉikaze, vi ne plene profitas: jen via domo truita; ke tio estis necesa, mi konsentas, sed ankaŭ necesaj estos gravaj riparoj. Tra tie ili eniris, ĉu ? Tra tie ili fuĝis, ĉu?
-- Jes, jen vero.
-- Vi ne povus diri alion.
--Ĉiukaze, diris Izengreno, rulante la okulojn, malbeno al tiu, kiu forprenis miajn ŝinkojn, se mi sukcesas malkovri lin.

Renardo ne plu respondis; li paŭtis kaj foriris, kaŝridaĉante. Jen la unua aventuro, la komenco de Renardo. Poste li faris pli, malfeliĉe por ĉiuj kaj aparte por sia kunulo Izengreno.

F INO



# ESTRARO
# de
# « ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux

******************

<u>Prezidanto</u> :  Bernard SARLANDIE
24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tél : 06 83 29 40 13
Mail : bernard.sarlandie@gmail.com

<u>Sekretario</u> :     vaka posteno

<u>Kasistino</u>   :     Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr